

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 192
18. 5. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Kōln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,20 sv. fk. por landoj, kies valuto
sufiĉe maksimume 50% por ĉiuj aliaj
landoj 0,08 dol. aŭ 0,25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fk. (Ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fk.),
en „Internacia Komerco“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Kunsido de KR kun UEA en Genève 21-23 aprilo.

Ampleksa laboro. — Atentintaj decidoj. — Simpligo de la instancaro. — Forigo de l' KKK.

Konferenca resonado.

En la tempo de senhala progresado de Esperanto montriĝis, ke niaj universalaj kongresoj pli kaj pli fariĝas ĉefe demonstracioj por montri al la vasta publiko la amplekson kaj forton de nia movado. Montriĝis ankaŭ, ke oni dum la kongresoj nur povos ĝenerale pritrakti diversajn problemojn kaj ke, por serioze pritrakti ilin, estas necese, dispartigi la laborprogramon de la demonstraciaj kaj amuzaj. En Wien oni aplikos unuan fojon tiun ĉi sistemon, kaj oni vidos, ke ĝi estas laicela.

La efektivo de la kontrakto de Helsinki montris plie, ke por detale pritrakti kaj esplori gravajn problemojn, preparoli larĝajn projektojn kaj decidi pri ili estas nepre necese, ke la reprezentantoj de la nova unueca organizo — Centra Komitato (C.K.), Konstanta Komitato de Naciaj Representantoj (K.R.) kaj Universala Esperanto Asocio (UEA) — kunvenu en apartaj kunsidoj ekster la kongresoj.

Dum pasko kunvenis unuan fojon tiuj reprezentantoj en Genève. Ni publikigas hodiaŭ la oficialan protokolon de la kunsido. Ĝia amplekso montras, kiom multa laboro estis farata. Ĝi sciigas ankaŭ vicon da tre gravaj decidoj akceptitaj de la kunsido. Ĉefaj estas tiuj pri subteno de UEA per la naciaj societoj, la ordigo kaj aktiro de la Centra Biblioteko en Paris kaj la plej grava de la forigo de la sole komplikiga Konstanta Komitato de la Kongresoj (K.K.K.). Ĉefa principo de granda organizo estas labori laŭ plej eble simpla sistemo, evitante tro da instancoj, kiuj neniel akcelas la laboron. koncerne nian movadon la solvo sendube estos salutata de ĉiuj larĝvidaj esperantistoj. La sperto montris, ke K.K.K. estas superflua. Post tio oni espereble ankaŭ konstatos baldaŭ alian ordigon de la kongresaj financoj. Nia movado bezonas tiom da mono, ke ni devas havi severan financsistemon.

Resume: la laborkunsidoj en Genève plenumis gravajn laborojn. Restas nur por valorigi la decidojn, ke la naciaj societoj kaj individuaj esperantistoj faru ĉion necesan, konsciaj pri tio, ke efektiva decidoj la decidon ili akcelas la pluan progresadon de nia granda kultur-movado ĝis la fina venko.

Robert Kreuz.

Oficiala protokolo.

Kvardeko da delegitoj kaj reprezentantoj esperantistaj alvenis al Genève por la kunveno de pasko, kaj multaj jam alveturis jaŭdon kaj merkredon antaŭ pasko.

Sabato vespere okazis kunveno de la Centra Komitato ĉe D-o Privat, kaj dimanĉon posttagmeze la delegitoj kaj membroj de la Grupo de Genève kune vizitis la tombon de la fondinto de UEA Flector Hodler kaj admiris la esperantan subskribon sur la marmoro kaj la originalan basreliefon skulptitan de Pedro Meylan: „Per amo al unueco.“

Parolis tie s-oj Poncet, Strómboli kaj Dietlerle, memorigante pri la granda ŝuldo de ĉiuj esperantistoj al la pionira laboro de Hodler.

En la nomo de UEA s-o Jakob metis florkronon sur la tombon.

Dimanĉon vespere je la 8¹/₂ h. la Grupo Stelo de Genève akceptis la delegitojn en la Zamenhofa domo, kie nun sidas la Internacia Ligo de Virinoj por Paco kaj Libereco. S-o Borsa bonvenigis ĉiujn kaj afable respondis s-oj Edmonds, Dietlerle, Delanoue, Isbrücker, Kenn, Piliik, Strómboli, Balkanyi. Carme parolis s-inoj Umaniski kaj Isbrücker antaŭ la temango.

Unua laborkunsido.

Lundon je la 10,10 h. en Palaco Eynard, tre impona salono, ĝis nun uzita nur por interstataj konferencoj, D-o Privat malfermas la kunsidon en la nomo de la Centra Komitato, salutante la reprezentantojn de la naciaj societoj kaj la komitatanojn kaj ĉefdelegitojn de UEA sidantaj dekstre kaj maldekstre de la verda tablo. KR kaj UEA estas la du elektantoj de la CK kaj estas kunvokitaj por doni al ĝi sian opinionon, siajn dezirojn kaj siajn decidojn pri financaj kaj propagandaj aferoj.

D-o Privat legas la kontrakton de Helsinki, bazo de la tuta, nova organizo de la Esperanto-movado.

Poste li anoncas kun bedaŭro, ke s-o Stettler, prez. de UEA, rifuzis novan reelekton en la Komitato pro sia sanstato, kaj ke la Komitato de UEA unuanime elektis lin Honora Prezidanto de la Asocio. En ties nomo li prezentas al s-o Stettler modestan, sed tre artan arĝentan florumon kun gravurita enskribo; dankante lin pro la 15-jara energia kaj kompetenta sindonado al solidigo de UEA.

S-o Stettler korusite dankas kaj fidas al la nuna direktoro s-o Hans Jakob por sperte gvidi la administran laboron de UEA, dum D-o Privat prezidus la superan gvidadon. Li mem estos feliĉa liberiĝi iom de tro lacigaj respondecoj sed tamen restos fidela aganto por UEA, kiam lia sanstato permesos tion.

Laborkunsido de K.R.

Ferminte tiun UEA-parencezon D-o Privat tiam petas s-on Edmonds, sekretarion-kasiston de KR malfermi la laborkunsidon de KR kaj voki la reprezentantojn de la naciaj societoj.

Ĉeestas por:

Aŭstruja Esperanto Delegitaro	s-o Schade
Brita Esperanto Asocio	„ Wadhams
Ĉeosl. Asocio Esperantista	„ Hromada
Ligo de Germanaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakio	„ Scholze
Danziga Esperanto Asocio	„ Kreuz (anstataŭanto)
Dana Centra Ligo	s-ino Blicher
Societo franca p. l. prop. d. E.	s-o Poncet
Germana Esperanto Asocio	„ Kreuz
Nederlanda Societo	„ Isbrücker
Hungarlanda Esp. Societo	„ Balkanyi
Itala Federacio	„ Vaona (Toschi)
Pola Societo	„ Grenkamp
Svisa Societo	„ Stettler

Nur tiuj oficialaj reprezentantoj rajtos voĉdoni pri aferoj de KR, sed s-o Edmonds salutas ankaŭ la delegitojn de kelkaj Institutoj de Esperanto de diversaj landoj, kiuj afable ĉeestas kiel gastoj. Oni poste povos diskuti, kiamaniere iuj institutoj organizu en internacia instituta konsilantaro ĉirkaŭ la instrua faktestro de CK D-o Dietlerle.

S-o Edmonds klarigas la foreston de la Honora Prezidanto de KR Generalo Sebert kaj de la efektiva prezidanto s-o Merchant por malsano. Al ambaŭ la kunsido bondeziras tre kore.

S-o Edmonds petas la prezidanton de CK prezidi la kunvenon, kiu cetere povas esti de nun komuna, ĉar ĉiuj temoj interesas samgrade la du elektantojn de CK: nome KR kaj UEA.

Poste oni elektas unuanime kaj ambaŭflanke s-on Kreuz kiel ĝeneralan sekretarion de la kunsidoj.

S-o Edmonds anoncas, ke 21 naciaj societoj respondis la cirkuerojn de KR kaj unuanime konfirmis la elekton de s-oj Privat, Chavet, Dietlerle, Hromada, Kenn kaj Page al la CK kaj Merchant kaj Edmonds al estraro de KR.

S-o Jakob anoncas, ke UEA siaflanke konfirmis la elekton de CK.

S-o Edmonds donas la jenajn detalojn pri la kotizoj pagitaj de la societoj:

Por jaro 1923:	Jam pagitaj:
Svisa E. S.	sv. fk. 100.—
Brita E. A.	funtjoj 30.—
Pola E. S.	pol. mk. 500 000.—
E. S. de Finnlando	K. mk. 250,80
C. Dana E. L.	dan. kr. 114,50
Itala E. F.	liroj 100.—
Brazila L. E.	fr. fk. 200.—
Kalifornia E. A.	usonaj dol. 4.—
Aŭstralazia E. A.	funtjoj 2,2 ŝ. Op.
Ĉeĥoslovaka E. A.	ĉ. kr. 500.—
G. E. L. en Ĉeĥoslovakio	ĉ. kr. 100.—
Nederlanda S. E.	guldenoj 75.—
Sveda E. F.	sved. kr. 50.—
Franca S. F. p. E.	fr. fk. 146,50
Bulgara E. S.	sv. fk. 50.—
Aŭstruja E. D.	funtjoj 2,00

Baldaŭ pagotaj:

G. E. L. en Bulgario	lev. 300.—
E. S. de Estonio	e. mk. 800.—
Belga L. E.	b. fk. 100.—

Per tiuj sumoj restas en la kazo de KR 60 funtoj sterlingaj kaj 246 fr. fk. Por la jaro 1924 pagis la Japana Societo 665,60 fr. fk. kaj anoncis sin pretaj pagi kotizon la Germana, Rumana, Kataluna, Hungarlanda kaj Riga Societoj.

S-o Edmonds petas KR, decidi pri la tri jenaj demandoj: financa jaro, bazo de la kotizo, rajtoj de voĉdono rilate al pago. Post ĝenerala diskuto, komisiono estas petata samtage prezenti tekston, kiun la kunsido poste unuanime akceptas:

„La financa jaro de KR komencas kun la kalendara jaro, sed la societoj devas pagi sian kotizon antaŭ la unua de julio; alimaniere ili ne rajtos voĉdoni depost tiu dato ĝis ili pagos.“

Por la kuranta jaro la kotizo de naciaj societoj estas fiksata je 10% de la UEA kotizo (simpla membro) por ĉiu membro de la societo.

La societoj, kiuj ne povas pagi tiom, rajtos pagi pli malaltan kotizon je minimume la duono, sed kun proporcia malpligo de la voĉdonrajtoj. Por ne fermi la pordon al societo la estraro de KR povas escepte fiksi por unu jaro kotizon sub la minimumo, interkonsentante kun petinta societo. Tiam la voĉdonrajto estos ankaŭ proporcie malpligata. La estraro tion faru nur post atenta esploro de la cirkonstancoj.

Intertempe ĉiuj societoj pristudu la demandon pri estonta pli definitiva pagisistemo kaj sendu pri tio koncizajn opiniojn al la estraro de KR, por ke oni povu prezenti la tutan aferon kiel eble plej klare al la kongreso en 1925.“

Post tiu akcepto s-o Edmonds fermas la apartan KR diskuton.

Komerca eksperimento.

D-o Privat nun malfermas komunan diskutadon pri la unua temo de la ĝenerala tagordo, nome la komerca eksperimento, kaj atentigas la delegitojn pri la 8-paĝa oficiala dokumentaro, kiu kuŝas sur la tablo je ĉiu sidloko; tie ili trovos unuavice la raporton kaj proponon de s-o Edmonds.

S-o Edmonds klarigas la sekvojn de la komerca konferenco de Venezia kaj detale prikskribas la starigon en Britujo de komitato de britaj komercaj organizaĵoj kaj komercistoj por efektiviĝi rezolucion IX de tiu konferenco.

La komitato dissendis la anglan tekston de la raporto pri la Venezia Konferenco al komercaj ĉambroj en diversaj landoj, petante opinionon pri la decidoj de la konferenco. Ĝi ankaŭ pristudis la starigon de internacia eksperimento pri la instruado de Esperanto al komercistoj diverslandaj kaj decidis pri tio peti helpon unuflanke de la naciaj societoj esperantistaj.

La Prezidanto legas leteron de s-o André Baudet, komitatano de la Parisa Komerca Cambro, pri tiu sama punkto. Tiu grava korpo-

racio akceptis partopreni en internacia komitato por aranĝi la eksperimenton. Eble oni povos kunŝi por konstati la rezultojn en venonta printempo 1925 en Paris.

S-o Delanoue, invitata al la diskuto kiel reprezentanto de la franca societo „Esperanto et Commerce“ promesas; ke tiu grupo ekzamenos tiun eblecon kaj eventuale petos la Parisan Komercan Cambron inviti aŭ patroni tian kunvenon en Paris.

S-o Toschi prezentas zorge preparitan raporton de la Itala Federacio pri tiu ĉi afero. La Itala Komercia Ministro nun permesis kursojn en ĉiuj italaj komercaj lernejoj, sed oni povos tre bone ankaŭ organizi apartajn kursojn specialajn por komercoficistoj sub kontrolo de iu neŭtrala komerca institucio.

Poste s-oj Scholze, Poncet, Balkanyi, Wadham, Edmonds, Isbrücker, Ellersiek, Kreuz, D-o Dietterle, Döring, Hromada, Grenkamp, Pitlik, Delanoue, Stromboli kaj Profesoro Bovei, invitiita kiel sciencisto sperta je pedagogiaj eksperimentoj, partoprenas viglan diskuton pri la daŭro de la samtempa eksperimenta kurso en diversaj landoj kaj pri la komenco de la interkorespondado inter la lernantoj.

La jena decido estas unuanime alprenata:

„Oni starigu kursojn de ne pli ol 20 lernantoj por daŭro de ĉirkaŭ 3 monatoj kun fiksa nombro de 25 lecionoj unu-horaj, komencante je oktobro-novembro venonta ĝis januaro-februaro 1925 sub kontrolo de Komercia Cambro aŭ bone konata gazeto aŭ alia kompetenta neŭtrala institucio.

Pri la starigo de la kursoj oni kiom plej eble reklamu en la gazetaro, unue por havigi lernantojn kaj due por altrii la atenton de la publiko al la eksperimento.

La lernantoj, se eble, estu komercistoj diversspecaj. Post la instrua periodo de tri monatoj la kursanoj diverslandaj interrilatiĝu unu kun alia pri komercaj aferoj por provi la efikecon de sia scio pri la lingvo kaj de ĝia taŭgeco por komercaj celoj.

La atenton de la kursanoj turne oni kiel eble plej vaste dissendu por konvinki komercistojn pri la utileco de Esperanto.“

La jenaj delegitoj akceptis pleni sur sin aranĝon de tia eksperimento en sia lando aŭ sia urbo kaj interkorespondi kun s-o Edmonds pri la detaloj:

- S-o D-o Alfredo Stromboli, Lungarno Regio 17, Pisa,
- „ D-o Umberto Toschi, Viale Gozzadini 7, Bologna,
- „ Salo Grenkamp-Kornfeld, juristo, Jaslo,
- „ Georges Delanoue, Rue Ch. Divry, Paris 16e.
- „ Jean Couéaux, Av. du Clocher 3, Aulnay sous Bois,
- „ J. R. G. Isbrücker, v. Beverningkstr. 10, S'Gravenhage,
- „ Friedrich Ellersiek, Wilmsstr. 5, Berlin SW 61,
- „ Prof. Gustav Scholze, Clotildenstr. 6/II, Reichenberg,
- „ Augustin Pitlik, Krémencová 17, Praha II,
- „ R. Hromada, 333 Sochařka, Praha VII,
- „ Paulo Balkanyi, Hajos utca 15/II, Budapest,
- „ Franz Schade, Mollardgasse 55, Wien VII,
- „ Charles Edmonds, 21 Russelcroft Rd., Welwyn Garden City,
- „ D-o Pierre Bovei, 14 Ch. Sautter, Genève,
- „ Robert Kreuz, Schliessfach 2, Horrem b. Köln.

Komercista adresaro.

S-o Hromada, ano de la C.K., proponas starigon de adresaro de komercaj firmoj kaj publikaj oficoj kiuj povas korespondi per Esperanto, havante esperantistojn inter sia oficistaro.

Viglan diskaŭon pri la metodo partoprenis s-oj Döring, Privat, Dietterle, Poncet, Jakob, Delanoue, Balkanyi, atentigante pri la neceso, enmesi nomojn nur kun permeso de la firmoj kaj per tio certigi seriozecon de la afero.

S-o Kreuz deklaras sin preta disponigi por la preparado de la adresaro sufiĉe grandan liston de entreprenoj, uzantaj Esperanton, kiun li serioze kolektis en „Internacia Komercio“, li krome proponas peti la foirajn fakesistrojn disponigi la nomojn de firmoj k. t. p. kiuj jam interrilatis en Esperanto kun ili.

S-o Scholze akceptas por la Foiro de Reichenberg.

La jena teksto de S-o Hromada en la nomo de C. A. E. estis unuanime akceptata post kelkaj aldonoj:

„Gravan signifon por propagando kaj por praktika apliko de Esperanto havas adresaro de firmoj kaj oficejoj, korespondantaj esperante. Bedaŭrinde ni ne posedas tian adresaron kaj, se ĝi ekzistis, ĝi estus trege malgranda kaj modesta, ĉar ĝis nun ekzistas relative tro malgranda nombro da komercistoj-esperantistoj.

Tamen inter la esperantistaro estas rimarkinda nombro da oficistoj okupitaj ĉe komercaj firmoj kaj publikaj oficoj — ekzemple inter anoj de Esp. Klubo en Praha estas 80% da tiaj oficistoj.

Tio signifas, ke ekzistas granda nombro da firmoj, kiuj estas kapablaj korespondi esperante, havante oficiston-esperantiston, sed la publiko ne scias pri tio.

Se oni kolektus adresojn de tiaj firmoj kaj oficoj, oni posedus gravan propagandan kaj praktikan helpon, kiu farus rimarkindan impreson kiel je ĉiu komercisto, tiel je la larĝa publiko kaj

kiu povus esti gvidilo de ĉiuj esperantistoj serĉantaj per Esperanto aĉeto- aŭ vendolokojn.

Konsiderante la grandan propagandan kaj praktikan signifon de tia adresaro, la konferenco rekomendas:

1) Ĉiu esperantista grupo kaj ĉiu delegito de U. E. A. starigu nomaron de firmoj kaj oficoj (kun permeso de la nomiaj) ĉe kiuj estas okupataj esperantistoj kaj sendu la nomaron al U. E. A. La delegitoj klopodu instigi ĝeneralan rekomendon de komerca ĉambro ĥiasence.

2) Ĉiu esperantista grupo kaj ĉiu delegito de U. E. A. petu ĉe la firmoj ĥavantaj oficiston-esperantiston, ke ili sur ĉiuj siaj leterpapiroj uzadu atenton: „Oni korespondas en Esperanto“, kaj seligu al ĝi, ke ĝia adreso aperos en speciala adresaro senpage (ĉe grandaj firmoj certe ne restos sen impreso la renkonigo de diversfirman paperojn kun la cilita rimarko).

3) U. E. A. estu petata, ke ĝi kolektadu la adresojn ricevatajn de la grupoj kaj delegitoj kaj publikigu ilin — laŭfakte ordiginte — komence en Esperanto (ekzemple kiel kvarpaĝa okaza aldono en ĵarlibro, poste eventuale en speciala adreslibro, eldonata per helpo de pagitaj komercaj anoncoj).

S-o Poncet prezentas al la konferenco tre detalan planon pri propagando ĉe komercistoj per 10000 subskriboj de sindeveno al instruado de Esperanto al sia oficistaro, sed li ne insistas, ke la kunsido diskutu ĝin; ĉiu delegito ekzamenu hejme la planon kaj venigu de li pluan ekzempleron de la klarigoj kaj informu lin pri opinio. (S-o L. Poncet, Esp. oficejo, 30 Rue Ferrandière, Lyon.)

S-o Grenkamp insistas, ke la esperantistoj uzu mem nian lingvon por siaj personaj negocoj kaj mendoj eksterlande, ĉar nur tio instigas la komercistojn lerni nian lingvon.

D-o Spielmann, invitita kiel reprezentanto de la Internacia Ligo de Poŝtaj kaj Telegrafaj Oficistoj, subtenas tiun vidpunkton kaj informas ekzemple, ke la Internacia Telegrafa Oficejo en Bern baldaŭ bezonos oficiston esperantiston pro leteroj ricevataj en tiu lingvo.

Unuanime estas akceptata la propono, Grenkamp: „En persona negocado eksterlande oni nepre uzu Esperanton eĉ kun ne-esperantistaj firmoj.“

Dua laborkunsido.

U. E. A. kaj nacia societoj.

La Prezidanto malfermas la duan laborkunsidon lundon posttagmeze je la 3 h. kaj klarigas, ke en la nuna tempo ne plu taŭgas paroli unuflanke pri U. E. A. kaj aliflanke pri aliaj organizoj kvazaŭ estus diversaj kampoj en la esperantistaro. De post la kontrakto de Helsinki la tuta afero estas unu sama kun du agadkampoj. Ekzistas naciaj societoj por propagandi nacilingvini en certa teritorio, kaj internacia organizo de la individuaj esperantistoj por la ĝenerala uzo kaj disvastigo de la lingvo, kiu per si mem povas nur efiki internacie en la tuta mondo.

Estas do la devo de U. E. A. daŭre sin meti al la dispono de naciaj societoj por havigi al ili valoran materialon por la eblogo de esp. uzado, kiel ekzemple per la ĵarlibro, aŭ por la propagando, kiel ekz. per teknika konferencoj ktp.

Siaflanke estas la devo de la naciaj societoj varbi ĉiujn esperantistojn en sia lando por nia oficiala internacia asocio UEA. Anstataŭ konkurencon, la nova aranĝo devas krei male intiman kunlaboradon.

La konferenco ricevis interesan proponon de s-ino prezidantino de la Haga Grupo pri aŭtomata samtempa membriĝo al loka grupo aŭ nacia societo kaj UEA.

S-o Isbrücker opinias malfacila devigi iun ajn, sed oni povus konsideri faciligon de samtempa aliĝo. Ĉiukaze oni nepre metu en la tagordon de naciaj kongresoj apartan tempon por igi kaj varbi por UEA.

D-o Dietterle subtenas tiun vidpunkton kaj opinias, ke ankaŭ en la universala kongreso oni povus varbi 100 aŭ 2000 novajn anojn inter 4 aŭ 5000 partoprenantoj.

La propagando por UEA estis multe tro delikata ĝis nun, ĝi devus fariĝi iom pli brua kaj pli moderna. La naciaj reprezentantoj ĉi tie sin devigu publike raportoj kaj propagandi en sia venonta nacia kongreso pri nia nova internacia organizo UEA.

S-o Wadham opinias tute ebla, ke ekzemple la Brita Asocio havu naciajn kaj internaciajn membrojn. La unuaj pagus la ĝisnunan koizon 10 s. kaj la duaj unu funton sterlingan, kies duono irus al Genève por koizio de membro-abonanto. Li estas preta rekomendi tian aranĝon al B.E.A. kaj ĝojus ke aliaj landoj simile agu. Tiamaniere la naciaj societoj fariĝu mem varbantoj por la oficiala universala asocio.

S-o Jakob volonte disponigos al la naciaj societoj certan kvanton de la broŝuro ilustrita „UEA en la juĝo de la esperantistoj“, se ili sin turnas al la Centra Oficejo en Genève sufiĉe frutempe antaŭ sia nacia kongreso.

S-o Balkanyi proponas ke UEA donu procentaĵon kiel premion al naciaj societoj por varbado.

S-o Grenkamp subtenas la ideon kaj instigas la ĉestarantojn doni la ekzemplon por propra aliĝo kiel dumviva membro; li mem estas preta kaj aliĝas tuj je 300 svizaj frankoj oraj. (Aplaŭdo.)

S-o Hromada proponas kunlaboron de la naciaj societoj per komuniko al UEA de siaj membrolistoj por ebligi alvokon al tiuj anoj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis internacie.

S-o Döring preferus aliĝon al UEA eĉ kun forlaso de ĉiu nacia grupiĝo, ĉar nur la internacia estas grava.

S-o Rockmann, estrarano de UEA, kontraŭe juĝas necesa la konservon de naciaj societoj sed konsilas interkonsenton kun ili.

S-o Stettler je la nomo de UEA dankas al la reprezentantoj de naciaj societoj por ilia fervora kunhelpo kaj petas transdoni al la societo la oficialan dankon de la Universala Asocio kaj la gratulon pri la nova atmosfero tre ĝoja, kiu nun regas en la esperantistaro.

S-o Edmonds konstatas efektive tiun internacian atmosferon, kiu estas ĝuste la plej valoro rezultato de la 13jara laborado de UEA, kristaligita nun per la kontrakto de Helsinki. Li insistas, ke la tuta esperantistaro bone komprenu, ke UEA estas nia ĝenerala oficiala asocio tutmonda.

La jena rezolucio estas unuanime akceptita de la reprezentantoj de la naciaj societoj:

„La kunveno de K. R. en Genève, 22 aprilo 1924, konvinkita, ke la internacia rolo de Esperanto kaj pro-ĝi la oficiala internacia organizo de la individuaj esperantistoj (UEA) meritas la plej viglan atenton de la naciaj societoj, varme rekomendas al ili:

a) ke ili ne preterlasu okazojn propagandi por UEA kaj montri al siaj membroj la neceson partopreni la internacian movadon;

b) ke ili ebligu la samtempan aliĝon al UEA nacia societo kaj al UEA, ĉu kreante specialan klason de membroj internaciaj, ĉu faciligante ĝin almenaŭ per administraj metodoj starigotaj interkonsente kun la estraro de UEA.“

D-o Stromboli opinias, ke la tempo jam pasis por nacia organizado de nia movado, kaj ke nur la internacia povas vere efiki. Ĉiu-kaze oni varbu la lernantojn en la fino de la kurso kaj ne lasu ilin forflugi. D-o Privat konstatas, ke la italoj fariĝis la posmilitaj filozofoj de la esp. movado kaj faras radikalajn proponojn por renversi la akceptitajn ideojn. Jam en Haga Komandanto Alessio iniciatis gravajn ŝanĝojn kaj estis necesaj tri jaroj por iom ekmarŝi en lia direkto. Ni ne povas iri tiel rapide kaj D-o Stromboli devas ankoraŭ atendi iom da tempo. Dume nacilingva propagando estas tre utila kaj naciaj societoj havas sian rolon por tio.

Pri la kursoj li komunikas proponon de s-o Poncet antaŭsenditan al la konferenco kaj ankaŭ subskribitan de s-o Levin, ĝenerala sekretario de la grupo en Lyon. Unuanime oni akceptas la jenan rezolucion:

„Je la fino de ĉiu kurso la instruisto klarigu al siaj lernantoj la funkciadon de UEA por ebligi tujan uzadon de la lingvo kaj varbu ilin kiel membrojn.“

S-o Jakob sendigos ekzempleron de la gazeto „Esperanto“ al adresoj montritaj de kursgvidistoj, se ili sendos al la Centra Oficejo en Genève malgrandan liston de siaj 5 ĝis 10 plej seriozaj lernintoj.

Responde al s-o Isbrücker li proponas la samon por kontentigi novajn membrojn, kiuj devos atendi tri semajnojn por ricevi la membrokarton kaj ĵarlibron. Tiamaniere ili almenaŭ ricevos tuj sian presadon.

Statistiko.

D-o Dietterle, fakesiro de C.K. por instruado kaj statistiko, resumas sian raporton jam aperintan en la oficiala dokumentaro de la konferenco. Li insistas pri la graveco de akurataj statistikoj kaj montras, ke ĵusaj favoraj dekretoj de germanaj ministroj estis antaŭ ĉio ŝuldataj al ĝustaj ciferoj, kiuj ebligis konstati, ke por tri cent instruistoj sciantaj Esperanton oni trovas meze du aŭ tri, kiuj preferas alian helplingvon. Post mallonga diskuto pri tiu ĉi temo la jena rezolucio estas unuanime alprenata:

„La kunveno, konstante ke la plej gravaj sukcesoj de Esperanto estis atingitaj per efiko de statistiko kaj ke bedaŭrinde multaj esperantistoj ne sufiĉe atentis tion, rekomendas ke la akurata respondo al statistikaj demandoj estu konsiderata kiel esenca devo.“

D-o Dietterle poste raportas pri bibliografio kaj admiras la komencitan laboron de la Centra Oficejo en Paris antaŭ la milito. Estas bedaŭrinde, ke la tasko restis nefinita. Nun urĝus almenaŭ pleniĝo de la simpla katalogo Davidov fermita en 1911. Pro la komplikeco de la decimala klasifiko kaj la neceseco atingi rapide rezultaton D-o Dietterle forlasis tiun sistemon kaj kontentigis pri nomaro laŭ fakoj. Ĉiu nacia societo sendu al li sur slipoj la precizan titolon de ĉiu esp. verko aperinta de post 1910. Post rimarkoj de s-oj Balkanyi kaj Toschi la konferenco rekomendis al C.K. organizi tiun aferon kun la naciaj societoj.

Centra biblioteko.

La Prezidanto raportas ke la C.K. deziras doni subvenciojn el la mono kolektita de K. R. por ebligi la konservadon de la Biblioteko de la Centra Oficejo en Paris. Sed, ĉar ni ne disponas

grandan sumon entutan, la C. K. bezonas scii, kian proporcion de la centra budĝeto la naciaj societoj konsilas dediĉi al tiu afero. Oni eble povus fari arangojn kun la francaj esp-istoj por ke ili prenu parton de la elspezoj je sia ŝargo por konservi samloke franclingvan propagandejon kaj savi la bibliotekon per komuna allogo.

S-o Poncet (Franca Societo) kaj Delanoue (Esperanto et Commerce) ne ricevis instrukciojn por respondi en la nomo de francaj samideanoj. Cetera la demando estas tre malfacila, kaj grandaj monsumoj mankas.

S-oj Toschl, Balkanyi, Isbrücker rimarkigas, ke grandparte la naciaj societoj kolektiis monerojn por la C. K. per K. R. kaj ne povus konsenti, ke tiu mono servu por simpla konservado de libroj en polvo. La mono devas iri ne al biblioteko, sed al propagando, al teknikaj konferencoj aranĝataj de C. K.

Por tio, kaj ne por biblioteko, ĝi estis kolektita.

S-oj Stremboli kaj Pitlik proponas ke oni ŝparu la monon kaj ke la biblioteko estu transdonata al ŝtata biblioteko aŭ universitato.

S-oj Dietterle kaj Edmonds malakceptas tiun vidpunkton, dirante ke la biblioteko devas aparteni al la esperantistaro kaj resti je ĝia dispono.

S-oj Stettler kaj Ellerstiek rimarkigas, ke eldonistoj sendis sian libron al Paris kredante ke la biblioteko jam apartenas al la esperantistaro.

D-o Privat demandas, kion devas fari la C. K. en tiu rilato, se la naciaj societoj ne permesas al ĝi doni la monon intencian kaj samtempe malkonsentas je transdono al ekstera institucio.

S-o Edmonds formale proponas ke C. K. akiru la bibliotekon kaj decidu mem pri ĝia transporto tien, kie ĝi povas plej utile kaj plej malkare konserviĝi. En la nomo de la britaj esperantistoj li certigas ke oni trovas en London taŭgan sidejon esperantistan kaj sufiĉe da mono por pagi zorganton.

S-o Kenn deziras ke la biblioteko restu en Paris sub zorgo de la C. K.

Per alkova voĉdono la reprezentantoj de naciaj societoj decidas:

Ke la C. K. ne rajtu subvencii la bibliotekon en Paris, se ĝi ne estos transdonata kun ĉiuj rajtoj al la C. K. kaj en tiu lasta okazo ne elspezu por ĝia konservado pli ol kvaronon de sia jara budĝeto. La C. K. tuj klopodu akiri la plenan posedon de la biblioteko traktante kun la nuna konservanto, Generalo Sebert, al kiu la tuta esperantistaro estas danka pro tiu valora fondaĵo.

S-o Poncet voĉdonas jes kun rezervo *ad referendum* ĉar la franca societo ne donis al li instrukcion pri ĉi tiu punkto.

Poste la komuna kunsido de K. R. kun UEA decidas ambaŭflanke unuanime, ke la diversaj oficialaj institucioj ŝparu kostojn de sekretariejo per la ĵena sistemo.

Lingva Komitato kaj Akademio elektu sian propran sidejon, eventuale ĉe la prezidanto. K. R. fiksu sian sidejon en London ĉe la nuna estraro.

C. K. uzu la Centran Oficejon en Genève. Ĉiuj subkomisionoj de la C. K. havu sidejon ĉe la fakesiro respektiva.

Kongreso en Wien.

London vespere je la 8,45 h. la konferenco havas noktan kunsidon por akceli la plenumon de la tagordo.

S-o Schade alportas tre detalan informaron pri la tuta arango de la Loka Kongresa Komitato en Wien kaj montras, kiamaniere la unuaj tri tagoj de la Wien'a Kongreso estos plene dediĉotaj al serioza laboro (kun distraj vesperoj) kaj la sekvantaj tri tagoj estos dediĉotaj al amuzaĵoj, teatraj prezentatoj kaj kelkaj fakaj kunsidoj.

Poste okazas tre utila rondsiala interdemando kaj respondado inter la delegitoj kaj s-o Schade pri ĉiuj flankoj de la kongresa organizo. Fine D-o Privat dankas s-on Schade por la afabla informado kaj rekomendas ke ĉefa zorgo estu direktata al la gazeta propaganda valorigo de la kongreso. La loka komitato aranĝos specialan centron por la ĵurnalistoj, sed estos necese, ke ĉiuj naciaj societoj klopodu per alkonduki kun si unu aŭ du gravajn korespondantojn de tagĵurnaloj.

Ĝis nun tiu parto de nia propagando estis vere tro malatentita, dum ĝi estas preskaŭ pli grava ol la kongreso mem, ĉar je kio utilas la plej bela sukceso, se neniu aŭdas pri ĝi ekstere?

S-o Kreuz rekomendas ke la diversaj fakaj esperantistaj organizaĵoj komencu jam nun seriozan preparon de sia kunsido en Wien. Subtenas tiun vidpunkton s-oj Isbrücker, Stremboli, Spielmann.

D-o Privat interkonsente kun la financa fakesiro de C. K. demandas, ĉu la loka komitato estas preta starigi imposton de 10% sur ĉiuj plezurbiletaj dum la Wien'a Kongreso por havigi iom da mono por la propaganda kazo de C. K.

La konferenco unuanime decidas subteni tiun peton, kaj s-o Schade ĝis transdonos kun subteno al la Loka Komitato.

S-o Stettler petas klarigojn pri la kontoj de la kongresoj ĝenerale. En tiu rilato regas ĝis nun plena mallumo, kaj oni ne scias kion faris K. K. K.

D-o Privat respondas, ke de post la funkciigo de la kontrakto en Helsinko la K. K. K. devus fariĝi subkomisiono de la Centra Komitato, sed kelkaj ĝiaj membroj ne akceptis tiun situacion kaj volas daŭrigi la antaŭajn sistemojn. La Centra Komitato mem estas tute ne informita pri la ĝisnunaj kontoj kaj estas nun necese iel ajn komencaj sur tute nova bazo de post Wien'o. Li petas opiniojn pri ĉi tiu problemo.

S-o Isbrücker, organizinto de la Haga kongreso, konstata, ke li mem sidis kelkare en la K. K. K. kaj neniam vidis aŭ aŭdis ion pri la profitmono, kiun li transdonis post la kongreso. Tia sistemo ne devas plu daŭri. Krom pri la loko de estonta kongreso, la K. K. K. neniam petis de li ian konsilon pri la organizaj spertoj faritaj. Estas do demando, ĉu tiu kongresa komisiono vere nun utilas aŭ malutilas. Li proponas, ke oni forigu tiun superfluan organizaĵon kaj decidu, ke Centra Komitato mem zorgos pri kongresoj kun la helpo de loka komitato kaj havu tiucele fakesiron inter siaj ses membroj. Tiu fakesiro povos laŭvole sin ĉirkaŭi per konsilantoj el antaŭaj kongresorganizintoj.

S-oj Hromada, Kreuz, Wadhams, Grenkamp, Schade, Edmonds, Balkanyi tre energie subtenas tiun vidpunkton por ĉesigi malklaran situacion. D-o Privat kaj D-o Dietterle rimarkigas, ke simila decido necesigus ŝanĝon de la kontrakto de Helsinko. Ĉu ne sufiĉas ke la konferenco interpretu la paragrafon 4, igante tute klara ke la K. K. K. estas nur subkomisiono?

S-oj Isbrücker kaj Stettler respondas, ke neniel-utilas eternigi malklaraĵojn. K. R. kaj UEA elektis C. K. por ordigi ĝuste tiujn aferojn. Ili rajtas korekti sian propran tekston, kiam ili volas, ĉar ili estas la pagantoj kaj la decidantoj.

La Prezidanto informas, ke ĉiukaze komuna decido de K. R. kaj UEA tie ĉi devus nepre esti poste submetata al balota konfirmo skriba de K. R. kaj UEA.

La ĵena teksto nova estas akceptata per alkova voĉdono por la modifota artikolo 4 de la Helsingsforska kontrakto:

„La Centra Komitato okazigos la universalejn kongresojn kaj komisias ilian lokan arangojn al Loka Organiza Komitato.“

Respondis jes la societoj pola, nederlando, germanbohema, ĉeĥoslovaka, aŭstra, hungara, svisa, germana. Sin detenis brita, dana, kaj franca delegitoj, klarigante, ke, ĉar la afero ne staris sur la tagordo, ili rajtas nur ĝin referi al siaj respektivaj societoj malgraŭ sia persona simpatio al la decido. Iliaj societoj respondos skribe post esploro.

La Prezidanto konstata, ke la decido ne povas fariĝi valida ĝis K. R. kaj UEA komunikos al la Centra Komitato la rezultaton de posta skriba baloto pri tio. La ĉi tiea voĉdono povas esti nur interkonsenta propono al ambaŭ korporacioj.

Laŭ propono de s-o Stettler estas poste unuanime decidite: komisii la Centran Komitatojn esplori la tutan financon problemon de la estontaj kongresoj. La kunsido fermiĝis noktomeze.

Gazetservo.

Mardon matene, je la 10,05 h. la Prezidanto malfermas la diskuton pri gazetservo kaj atentigas pri la grava raportoj de s-o Hromada en la oficiala dokumentaro.

S-o Hromada, fakesiro de CK por gazetservo, resumas sian raporton kaj insistas pri la urĝa neceso diskonigi al la mondo la ekzistantan faktaron de la esperantista vivo. Tro multe da naciaj societoj ne sufiĉe atentigas tiun gravan devon kaj la rezultato estas, ke la mondo scias multe malpli pri la progreso de Esperanto ol la veron. Multaj personoj miras kaj konvinkigas nur, kiam ili vidas, ke nia afero jam vivas kaj funkcias. Aliparte estas ankaŭ tre bona reklamilo por Esperanto, kiam oni represas bonan artikolon pri ekstera afero, havigitan per Esperanto aŭ aperintan en Esperanto-gazeto. La nura noto post la artikolo impresas la leganton. Depost iom da tempo tiu represado multe disvastiĝis.

En Ĉeĥoslovakio la CAE havas bonan gazetservon kun 150 kunlaborantoj, inter kiuj 50 laboras konstante kaj regule. La rezultato estas, ke la tuta lando aŭdas ofte pri nia afero.

D-o Privat al dankas la raportinton kaj konigas la detalan planon, senditan de s-o Poncet pri simila gazetservo en Francujo.

S-o Balkanyi priskribas la gazetservon de la Hungarlanda Societo. Depost la 1 januaro li mem ricevis el Budapeŝt kaj el provincoj 150 gazetelranĉaĵojn, inter kiuj 68 per Esperanto kaj 92 per Esperanto.

S-o Delanoue raportas pri la gazetservo en Paris kaj aprobas la ideon de internacia centro

por informi la naciajn gazetservojn, same s-o Vaona pri Italujo kaj s-o Isarücker pri Nederlando.

D-o Dietterle priskribas la funkciadon de la germana gazetservo kaj aprobas la internacian planon, kun centro sub la gvidado de s-o Hromada.

S-o Wadhams raportas pri la brita arango kaj ankaŭ subtenas la ideon de internacia organizo, sed atentigas, ke la brita gazetservo povas nur dissendi novaĵojn pri Esperanto, sed ne pri aliaj temoj por ne riski falon en reklaman aŭ en naciaĵon.

La ĵena rezolucio estis unuanime akceptata: „La Geneve'a kunveno, aŭdinte raportojn de s-o Hromada kaj de la diversaj naciaj societoj brita, ĉeĥoslovaka, franca, hungara, itala, nederlanda, pri la gazeta servo en siaj landoj, danke akceptas ilin, kaj esprimas la deziron, ke ĉiuj naciaj societoj reprezentataj en KR starigu jam en 1924 esperantan gazetservon interkonsentante pri tio kun la Centra Komitato (fakesiro: s-o Hromada, 355 Sochařska, Praha VII).“

D-o Privat konigas gravan proponon de la rumana esperantistoj s-o Fischer kaj Ce pri eldonado de sciencaj verkoj. Cetera en la oficiala dokumentaro troviĝas ankaŭ la raporto de Prof. Bakhuser pri la sama temo. Estas certe, ke ĥinaj, japanaj, aŭ eĉ estonaj, latvaj aŭ albanaj studentoj tute ne-esperantistaj, havus avantaĝon eklerni Esperanton, almenaŭ por ĝin legi, se ekzistus en tiu lingvo la ĉefa verkaro de tutmonda scienco, kiun oni trovas nur en unu el la ĉeflingvoj de Eŭropo kaj Ameriko.

S-o Stettler proponas, ke oni komisii la Centran Komitatojn esplori la aferon. Post diskuto, en kiu estis ankaŭ diversefoje aludata al la grava traduko de la malnova testamento de D-o Zamenhof, oni esprimis unuanime la ĵenan deziron:

„Konsciante la gravecon eldoni en Esperanto ĉiujare unu aŭ du el la ĉefaj sciencaj verkoj de la tutmonda scienca trezoro, kaj ankaŭ la neceson baldaŭ publikigi la malnovan testamanton tradukiten de D-o Zamenhof, dankas al ĉiuj esperantistoj, kiuj iniciatis ĉi tiu aferon, kaj esprimas la deziron, ke la malnova testamento povu baldaŭ esti publikigata kaj ke la eldono de sciencaj verkoj komencu kiel eble frue, komisias la Centran Komitatojn esplori kaj akceli ĉi tiu aferon.“

Ekzamenoj.

La Prezidanto konigas diversajn leterojn proponantaj internacian ekzamenojn kaj la refunkciigon de la Internacia Instituto de Esperanto fondita en 1907 kaj oficiale aprobita de la 4-a Universala Kongreso de Esperanto en Dresden por kreo de normalaj lernejoj kaj de internaciaj diplomoj.

Li demandas, kion opinias pri tio UEA kaj la naciaj societoj.

La ĉefa celo de la instituto estis antaŭ la milito certigi la unuecon de la lingvo speciale en elparolado kaj esprima klareco. Rilate al tio internaciaj ekzamenoj kun internacia juĝantaro povas tre efiki. Ankaŭ ekzistas multaj landoj, kiuj ne posedas nacian Esperanto-institutojn kun oficialaj diplomoj kaj pro tio deziras la internaciajn.

S-o Kenn subtenas tiun restarigon, ĉar en Ĥina Respubliko la efiko de internacia diplomo estas multe pli granda ol tiu de nacia.

S-o Dietterle atentigas pri la registara kontrolo de naciaj diplomoj en kelkaj landoj kaj opinias, ke oni lasu malsaman rolon al la naciaj institutoj kaj al eventuala internacia servo ekzamenata. Pri ekzamenoj en kongreso li rekomendas ne tion fari, sed uzi tempon antaŭe aŭ poste.

D-o Stremboli memorigas la interesan planon de D-o Privat, antaŭ 15 jaroj pri fondo de internacia Esperanto-universitato komencante per organizo de somerkursoj en Esperanto pri gravaj temoj de nia literaturo, sintakso, historio kaj instruado. Nun venis la momento repreni tiun aferon por ĝin ekrealigi.

S-oj Poncet kaj Wadhams subtenas la ideon de la internacia konsilantaro ekzamenata ĉirkaŭ la instrua fakesiro de C. K. En ĝi sidu po unu reprezentanto de la naciaj institutoj aŭ akzamenaj komisioj kaj la nomo estu „Internacia Instituto de Esperanto“ laŭ la malnova statuto, kiu jam antaŭvidis la sidejon en Genève. D-o Dietterle demandas, de kie venos la mono.

S-o Pitlik respondas ke ĉiu instituto povus tre bone pagi sufiĉe altan kotizon al la Centro, same kiel la naciaj societoj faras al K. R.

S-o Schade atentigas ke la antaŭkongresaj ekzamenoj kun enskriba pago povos ankaŭ doni rimedojn al la internacia instituto kaj ĉiukaze pagi la vojaĝon de la internacia juĝantaro, kondiĉe ke la afero estu anoncata frue antaŭe por ebligi sufiĉan nombron da enskriboj.

La ĵena rezolucio estis unuanime akceptata: „La Centra Komitato restarigu sub sia instrua fako la internacian instituton de Esperanto kun konsilantaro entenanta po unu reprezentanto de ĉiu instituto aŭ nacia ekzamenata komisio, kiu akceptos partopreni en la komunaj elspezoj per regula kotizoĵa fiksoita interkonsente.“

La prezidanto legas telegramojn de Sveda Esperanto Federacio, Esperanto Societo de Finnlando, de s-o Pedrazzini en Locarno kaj Blaise komitatano de UEA en London.

Kongreso 1925.

La prezidanto malfermas diskuton pri la loko de la Universala Kongreso en 1925. Decidas la



